

Eugen Höfling,
Malnova vi studenta glor'

tradukita de Manfredo Ratislavo

1 Malnova vi studenta glor',
Vi gaja kaj libera!
Nun longe vi jam pasis for,
Vi temp' de vivo vera!
Ĉirkaŭrigardas vane mi,
Ne vidas spuron mi de ĝi.
Ho, kara Dio mia!
Ho, tempŝanĝiĝo kia!²

2 La ĉapon kovras polvo jam,
La vesto diseriĝis,
Ne brilas la batil-ornam',
La klingo jam rustiĝis.
Ne sonas plu la trink-kantad',
Ne plu rapir- kaj spron-sonad'!
Ho, kara Dio mia!
Ho, tempŝanĝiĝo kia!

3 Ho, kie estas ĉiuj la
ŝercemaj kuntrinkantoj?
Similaj estis ili ja
al reĝoj kaj regantoj! –
Retiris sin sen iluzi'
en filistrujon tiuj ĉi.
Ho, kara Dio mia!
Ho, tempŝanĝiĝo kia!

4 Jen skribas kiel oficist'
Raporton iu ulo,
Alia estas instruist',
Alia gazetulo.
Predikas iu kun persist',
kaj plia estas kuracist'.
Ho, kara Dio mia!
Ho, tempŝanĝiĝo kia!

...

²aŭ pli laŭvorte tradukite:Afer-ŝanĝiĝo kia!

5 Sed brava kun-studenta kor'
Neniam malvarmiĝas,
La amikec' ne iĝas for,
ĝi re-efektiviĝas.
La ŝelo nur, ŝanĝiĝis ĝi,
Interne restis samaj ni.
Je l' kerno ni teniĝas.
Je l' kerno ni teniĝas.

6 La manojn nun ekprenu vi,
Por ke la amikeco
Sin renovigu inter ni,
La lig' de l' fideleco!
Tintigu nun la glasojn vi,
Ĉar vivas ja ankoraŭ ni
Kaj nia fideleco!
Kaj nia fideleco!

*Traduko de la Germana poemo "O alte Burschenherrlichkeit" de EUGEN HÖFLING (*1808 – †1880) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2003-09-21.*

MR-407-3a / Arg-44-89 (2003-11-20 10:19:41)

Verkita en 1825 de Eŭgen' Hojfling' (Eugen Höfling) en Marburgo, Germanio. Esperantigis: Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff, (1938 -) en 2003-09-21